# Informilo de Marto 2013

*Numero 4, Marto 2013*

## Reprezentantoj de la Asocio Multe Aktivas en la Ĉefsidejo de UN

Du akceptoj de reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj ĉe UN prezentis bonan okazon por informado pri Esperanto kaj la agado de UEA ĉe UN. Al la unua, la 25-an de oktobro, venis entute kvar membroj de la laborgrupo de UEA ĉe UN, Humphrey Tonkin, Ulriĉ Becker, Ria Boemi kaj Neil Blonstein. En la dua akcepto, organizita honore al la nova Vica Ĝenerala Sekretario de UN, Jan Eliasson, partoprenis Tonkin kaj Blonstein.

D-ro Tonkin kaptis la okazon mallonge paroli kun s-ro Eliasson pri la iama rolo de Ambasadoro Ralph Harry, el Aŭstralio, dum lia restado en UN en la 1970aj jaroj, kiam ankaŭ s-ro Eliasson komencis sian UN-laboron.

Neil Blonstein, direktoro de la oficejo de UEA ĉe UN, estas regula ĉeestanto en la ĉiusemajnaj informsesioj por neregistaraj organizaĵoj organizitaj de la Fako pri Publika Informado (DPI) de UN kaj ofte intervenas per demandoj. La 26-an de februaro li ĉeestis specialan informkunsidon pri la Tutmonda Konsultiĝo pri Neegalecoj, kiu okazis lastatempe en Kopenhago. Tie li havis okazon pridiskuti la laboron de UEA kun gvidantoj de la Bahaa Komunumo, kiu ĝenerale pozitive rilatas al Esperanto.

Okaze de Zamenhof-Tago la 15-an de decembro, okazis speciala kunveno de la Novjorka Esperanto-Societo. Inter la parolantoj estis du reprezentantoj de UEA ĉe UN, Sofija Soskina, kiu parolis pri la vivo de Zamenhof, kaj Humphrey Tonkin, kies temo estis "Kiel inventi kulturon? Zamenhof kaj Esperanto." Prezidis Neil Blonstein.

## ESPERANTO POR UN INVITAS AL KUNLABORO

Responde al komuniko de la laborgrupo de UEA ĉe UN en Novjorko, pluraj personoj anoncis sin por aktivigi la naskiĝantan organizaĵon Esperanto por UN (EUN). Kiel sciate, la organizaĵo jam havas sian propran retpaĝaron, www.esperanto-un.org, siajn ĉiujarajn seminariojn ĉe la Universalaj Kongresoj, sian agadgrupon en Novjorko, kaj centon da membroj tra la tuta mondo. Inter la celoj de la nova organizaĵo estas:

- plilarĝigi nian informadon al esperantistoj pri la laboro de UN
- krei instrumaterialon pri UN por Esperanto-kursoj kaj por instruistoj
- plivastigi nian retpaĝaron
- elserĉi la financajn rimedojn, kiujn ni bezonas por plenumi la laboron
- pliprofundigi nian informlaboron al ĉiuj ĉefaj organoj de UN tra la mondo
- serĉi kunlaboron kun aliaj similcelaj neregistaraj organizaĵoj
- intensigi fakulan interesiĝon pri la uzo de lingvoj ĉe UN
- starigi komunikkanalojn por niaj membroj
- peti aliĝon al UEA kiel faka asocio.

La laborgrupo, laŭ sia alvoko, "serĉas homojn (de ĉiuj aĝoj kaj el ĉiuj landoj) kun sperto, lerto kaj entuziasmo por transpreni taskojn en tiu ĉi agado." La mesaĝo de la laborgrupo aldonis: "Bonvolu mem proponi vin kaj proponi ankaŭ aliajn homojn, kiuj viatakse povus helpi nin. Skribu al: info@esperanto-un.org. Ni serĉas estraranojn, redaktorojn, administrantojn, helpantojn."

## UEA en NRO-Konferenco de UNESKO

De la 12-a ĝis la 14-a de decembro kunvenis en Parizo la Internacia Konferenco de la Neregistaraj Organizaĵoj havantaj oficialajn rilatojn kun Unesko. El 371 organizaĵoj 110 aliĝis al la konferenco, sed reale ĉeestis 97. Pluraj delegitoj ne povis veni, ĉar ili ne ricevis vizon ĝustatempe. Nome de UEA, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unesko jam ekde 1954, partoprenis Renée Triolle kaj Barbara Despiney, la konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe Unesko.

La konferenca temo estis "Kulturo kaj kulturoj: rekunigi universalecon kaj diversecon", pri kiu enkonduke parolis la franclingva kongolanda verkisto Alain Mabanckou. Li emfazis, ke Afriko, ekzemple, ne estas io unueca kaj ke afrikanoj ekster Afriko kreas aliajn Afrikojn kaj afrikajn kulturojn.

La temo estis traktata en atelieroj. En tiu pri "Kulturo kaj edukado" prelegis Catherine Deremble, kiu gvidas la Unesko-komisionon pri interkultura dialogo por paco. Laŭ ŝi, pro la multaj devenoj de la europaj lernejanoj, la edukado devas garantii la transdonon de ĉies origina kulturo. Al ŝia eldiro, ke por doni al la gejunuloj la necesajn ilojn por, interalie, kulturaj interŝanĝoj, "necesas konsideri, ke la angla estas necesa en tiu perspektivo", Triolle rebatis, demandante, kiel konservi la kulturan diversecon, se jam 95% de la kulturo de la mondo ŝajnas esti anglalingva, kaj la lokajn sciojn, se estos nur unu maniero pensi.

En la labora parto oni elektis la prezidanton de la Internacia Konferenco por dujara periodo. El kvar kandidatoj elektiĝis Patrick Gallaud, kiu vizitis la 87-an UK en Fortaleza en 2002. Oni elektis ankaŭ la membrojn de la Ligokomitato, kiu kunordigas la kunlaboron de NRO-oj kaj iliajn rilatojn kun la organoj de Unesko.

Krom ĉeesti la kunsidojn kaj plurfoje interveni en la diskutoj, la reprezentantoj de UEA aranĝis ankaŭ ekspozicion pri Esperanto. Por ke la delegitoj povu pli bone konatiĝi kun la aliaj NRO-oj kaj iliaj agadoj, la konferenca programo enhavis duhoran "liberspacan sesion", dum kiu ĉiu rajtis starigi ekspozicion.

## Mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario Okaze de la Tago de Homaj Rajtoj

Respekto de la homaj rajtoj estas enskribita en la Statuto de UEA, kaj sekve la 10-a de decembro, la Tago de Homaj Rajtoj, havas specialan signifon por esperantistoj. Okaze de la Tago de Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 2012, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj komunikis la jenan mesaĝon:

Ĉiuj homoj havas la rajton esti aŭdata kaj elformi la decidojn, kiuj havas efikon ĉe iliaj komunumoj. Tiu rajto estas enkadrigita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj formas integran parton de internacia juro, precipe en Artikolo 25 de la Internacia Konvencio de Civilaj kaj Politikaj Rajtoj.

Tra la pasinta jarcento, ni faris nekontraŭdireblan progreson laŭ la vojo de inkluzivo. Sed multe tro da grupoj kaj individuoj frontas multe tro da obstakloj. Preskaŭ ĉie, virinoj havas la rajton baloti, sed ili restas grandskale subreprezentataj en parlamentoj kaj pacaj intertraktoj, en ĉefaj registaraj postenoj kaj la estraraj ĉambroj de entreprenoj, kaj en aliaj decidofaraj pozicioj. Anoj de indiĝenaj popoloj ofte frontas diskriminacion, kiu malebligas al ili la okazon plene utiligi siajn garantiatajn rajtojn aŭ ne prenas en konsideron iliajn cirkonstancojn. Religiaj kaj etnaj minoritatoj – kaj same homoj handikapitaj aŭ tiuj kun alia seksa orientiĝo aŭ alia politika opinio – estas ofte malhelpataj partopreni en ŝlosilaj institucioj kaj procedoj. Institucioj kaj publika debato devas reprezenti sociojn en ties tuta diverseco.

Pli ĝenerale, en pluraj mondopartoj ni vidis konsternajn minacojn al pene atingitaj gajnoj en demokratia regado. En iuj landoj, civilsociaj grupoj frontas kreskantajn premojn kaj limigojn. Oni enkondukis leĝproponojn specife celantajn civilsociajn organizaĵojn, preskaŭ tute malebligante ilian funkciadon. Ĉampionoj de demokratio renkontis novajn kontraŭstarajn elpaŝojn. Ni ĉiuj devus maltrankviliĝi pro tia retroglito.

Eĉ en socioj kun bona historio, restas lokoj por pliboniĝo. Neniu lando sukcesis certigi, ke ĉiuj ĝiaj enloĝantoj povas plene partopreni publikajn aferojn, inkluzive de la rajtoj esti elektita al publika ofico kaj havi egalan aliron al publikaj servoj. Ne ĉiam sufiĉas dekreti novajn rajtojn aŭ forigi nejustajn leĝojn. Tro ofte, diskriminacio persistas en la praktiko, kreante barojn kaj starpunktojn foje malfacile supereblajn.

Vibraj civilsociaj grupoj lokiĝas inter la ŝlosilaj elementoj necesaj por la bonfarto kaj funkciado de kiu ajn nacio, kaj Unuiĝintaj Nacioj forte bedaŭras paŝojn faratajn por ilin subpremi. Ĝuste pro tio, okaze de la nuna Tago de Homaj Rajtoj, Unuiĝintaj Nacioj substrekas la rajton al partopreno kaj la ligitajn rajtojn kiuj ebligas tiun rajton, nome libereco de esprimiĝo kaj opinio, kaj de paca kunveno kaj asociiĝo.

La internacia juro klaras: sendepende de kiu vi estas kaj kie vi loĝas, via voĉo havas pezon. Je tiu ĉi Tago, ni unuiĝu por defendi vian rajton aŭdigi ĝin.

Je la 22-a de marto 1992, Unuiĝintaj Nacioj ekdisvastigis “Universalan Deklaracion pri Rajtoj de Akvo”. La intenco de tiu teksto estis interesigi kaj ekologie konsciigi loĝantarojn kaj ties registarojn, precipe koncerne la gravecon de akvo por homa postvivado. En la sekvinta jaro, je tiu sama dato, la Ĝenerala Asembleo de U.N. deklaris, ke la 22-a de marto estas Monda Tago de Akvo. Nun, la Legio de Bona Volo, kun kiu UEA kunlaboras kiel frata asocio, anoncis specialan kampanjon por konsciigi la homojn pri la graveco de tiu ĉi iniciato.

Detalojn vi trovos ĉe la retpaĝaro de Paiva Netto, prezidanto de la Legio: [http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=94049&cs=100](http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=94049&cs=100).

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*
*777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.*
*212-687-7041*
*www.esperantoporun.org*

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041